

La Espero

2006:6

Plebejo trovas la orsplenon

Jen ok paĝoj da Esperanta literaturo. Unue tradukaĵo de novelo de August Strindberg. Poste tri noveloj originale verkitaĵoj en Esperanto de svedaj verkistoj. Ankaŭ artikolo pri kiel recenzi libron kaj iom pli.

Här är åtta sidor esperantolitteratur. Först en översättning av en novell av August Strindberg. Sedan tre noveller skrivna i original på esperanto av svenska författare. Också en artikel om hur man recenserar en bok och litet mer.

La riĉulo iun fojon venis al la insulo kaj enamigis en ĝin. Kial, la riĉulo ne povis diri, sed li estis ravita; eble tiu insulo similis al forgesita infanmemoraro aŭ al bela sonĝo.

Li aĉetis la insulon, konstruis vilan kaj plantis ĉiaspeciajn agrablajn arbojn, arbustojn kaj florojn. La maro kuŝis tie; propran kajponton li havis kun standardo kaj blankaj boatoj; verkoj grandaj kiel preĝejoj ombrigus lian domon kaj freŝaj ventoj karese blovis super verdiĝantaj herbejoj. Li havis edzinon, infanojn, servistojn, tirbestojn; li havis ĉion, sed io mankis al li; estis malgravaĵo, sed plej grava el ĉio, li forgesis pensi pri ĝi: estis fontakvo. Oni fosis putojn kaj truis rokojn, sed elvenis nur sala, bruna akvo. Oni filtrigis ĝin, ĝi fariĝis klara kiel kristalo, sed restis sala. Tie kuŝis la ĉagreno.

Alvenis tiutempe favorato de la Sinjoro, kiu havis bonŝancon en ĉiuj siaj okupiĝoj kaj estis unu el la plej famaj homoj de la mondo. Ni memoras, kiel li per sia diamanta bastono batis la rokon kaj, kiel Moseo, igis la ŝtonon doni akvon. Nun oni diamantboros, same kiel oni boris en aliajn rokojn kaj ricevis akvon el ili ĉiuj. Oni boris ĉi tie; por cent taleroj, por mil, por pluraj miloj, sed oni nur ricevis salan akvon. Ĉi tie evidente mankis beno; kaj la riĉulo bone rimarkis, ke oni ne ricevas ĉion por mono, eĉ ne gluton da freŝa akvo, kiam oni havas malbonŝancon.

Li fariĝis melankolia kaj la vivo ne plu ridis. La lernejestro sur la insulo komencis legi malnovajn librojn kaj venigis maljunan saĝulon, kiu uzis di-

venvergon; sed tio ne helpis.

Sed la pastro, kiu estis pli saĝa, kunvokis iun tagon la lernejanon kaj promesis premion al tiu, kiu povos trovi herbon, kiu nomiĝas orspleno kaj indikas fontovejnoj.

— Ĝi havas florojn kiel alĉemilo kaj foliojn kiel saksifrago. Kaj aspektas orpolve kovrita sur la plej supraj folioj. Memoru tion!

— Florojn kiel alĉemilo kaj foliojn de saksifrago, ripetis la infanoj; kaj ili kuradis en arbaron kaj sur kampojn por serĉi la orsplenon.

Neniu el la infanoj trovis ĝin. Knaĉeto ja venis hejmen kun euforbio, kiu estas iom flava je la supro; sed ĝi estas venena, kaj la alia ne estas. Kaj ili laciĝis serĉi.

Sed estis knabineto, kiu ankoraŭ ne iris al lernejo; ŝia patro estis dragono, posedis farmeton, estis pli malriĉa ol riĉa. Lia sola trezoro estis la filineto; kaj ŝin oni en la vilaĝo nomis per la bela nomo Plebejo, ĉar ŝi ĉiam estis vestita en ĉielblua trikita jako kun larĝaj manikoj, kiuj svingiĝis, kiam ŝi moviĝis. Plebejo estas cetere malgranda papilio, kiun oni vidas plensomere sur herbejoj, kaj kies flugiloj similas al la petaloj de la linfloro, fluganta linfloro kun antenoj, kie la pistiloj situas.

Plebejo, tiu de la dragono, estis nekutima infano, kiu parolis saĝece sed kurioze, tiel ke neniu sciis, de kie ŝi havas la vortojn. Ĉiuj homoj ŝatis ŝin, kaj ankaŭ la bestoj; kokinoj kaj bovidoj sekvis ŝin, kaj ŝi kuraĝis frapati la virbovon mem. Ŝi ofte eliris sola, forestis, kaj revenis; sed kiam oni de-

mandis, kie ŝi estis, ŝi ne povis diri tion. Ŝi tiam tamen havis multon por rakonti. Ŝi vidis malkutimaĵojn, kaj renkontis kaj virojn kaj virinojn, kiuj diris tion kaj tion. La dragono ne malhelpis ŝin, ĉar li ŝajnis rimarki, ke ŝi havas iun, kiu protektas ŝin.

Iun matenon Plebejo eliris por vagadi. Tra herbejoj kaj arbaretoj ŝi direktis siajn paŝetojn; kaj ŝi kantis plejparte por si mem, kantojn, kiujn neniu antaŭe aŭdis kaj kiujn ŝi elpensis. La matena suno brilis junece, kiel se ĝi estus novnaskita, la aero sentiĝis fortika kaj satdorminta, la roso vaporigis kaj ĝia freŝa malseko malvarmigis la etan vizaĝon.

Kiam ŝi envenis la arbaron, ŝi renkontis verde vestitan viron.

— Bonan tagon, Plebejo, diris la viro. Mi estas ĝardenisto sur Sunmaldensejo. Venu kun mi kaj rigardu miajn florojn.

— Tro granda honoro por mi, respondis Plebejo.

— Ne, ĉar vi neniam suferigis plantojn.

Tiel ili iris kune kaj venis al la marbordo. Tie estis bela ponteto, kiu kondukis al insuleto, kaj tien ili iris.

Kia ĝardeno! En ĝi troviĝis ĉio, granda kaj malgranda, kaj estis ordigita kiel libro.

Li mem loĝis en domo konstruita el kreskantaj ĉiamverdaj arboj, pinoj, piceoj, juniperoj kun pingloj; la plankoj estis pretigitaj el kreskantaj ĉiamverdaj arbustetoj kaj herboj. Muskoj kaj likenoj kreskis en la fendoj de la planko por izoli; empetro, ursbero, linoj estigis la planktabulojn. La plafo-Daŭrigo sur paĝo 3.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Novembro 2006 • 94-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@glocalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2007: 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2007:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Telefon: P.g.a. flytt ingen just nu. Vi återkommer.

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona/
E-post: eldona@telia.com

Telefon: 031 - 12 05 94. Telefonsvarare finns.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Anita Dagmarsdotter

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11
961 76 Boden, tel. 0921-123 54
e-post: esperanto@glocalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Tomas Q Nilsson

Kie vi naskiĝis?
Övre Kågedalen, ekster Skellefteå.

Kie vi loĝas?
Härnösand


Pri kio vi laboras?
Mi estas historiisto kiu laboras ĉe la regiona muzeo, speciale kun multkultureco kaj evoluado de niaj ekspozicioj. Foje al foje mi laboras kiel interpretisto inter la sveda kaj la süahila aŭ kiel persona asististo al handikapulo.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?
Muziko, politiko, kuirado kaj ŝako.

Ĉu vi havas familion?
Mi loĝas en la komunumo "a'la Rym" kune kun du aliaj personoj - ambaŭ esperantistoj.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?
Mi aŭdis pri ĝi kiam mi studis en la gimnazio kaj ŝatis la ideon. Kiam mi transloĝiĝis al Uppsala mi renkontis amikon kiu komencis instrui min iom post iom.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?
Mi estas estrarano de Hernusando Esperantista Klubo. Mi fondis REVOjn, retaron de verdistaj esperantistoj, kiu inter alie proponis al la sveda par-



lamento ke lernejoj devas oferti esperanton kiel lingvoelekto. Krome mi aktivis ĉe la esperanta muzikscenejo.

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?
Ĝuste nun mi legas "La Frakseno Igdrasil" - kiun mi ŝatas. Julio Baghy plaĉas al mi. Mi ŝatus ke iu esperantigis la tanzanan verkiston Elieshi Lemma.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?
Mi estas la mondĉampiono en Bakio (kvazaŭ ŝaka tabloludo).
La Perdita Generacio aŭskulteblas ĉe http://dfg.rosnix.net/skivor/lpg_en_rusio/

La reguloj de Bakio klariĝas ĉe <http://masak.org/carl/wiki/index.php?title=Bucky> (bedaurinde nur en la angla)

Skribe intervjuis Leif Nordenstorm

Estimataj samideanoj!

Jam estas multe da neĝo tie ĉi en Boden. Antaŭ nur iom pli ol unu monato kiam tute ne estis neĝo mi kune kuna alia Boden-ano, Johan Krig-Ölund, sekretario de SEJU, iris al esperantista kunveno en Finnlando aliflanke de la bordo. Pri tio vi povas iom legi en n-ro 5 de *La Espero*. Ĝi venas kune kun tiu ĉi numero. Kial do venas du numeroj samtempe? Mi konfesu. Via redaktoro ne sukcesis kompletigi la kvinan numeron ĝustatempe. Tial estis pli bone redakti du numerojn kaj dissendi ilin kune.

Tiu ĉi numero estas literatura numero. Eble vi ni kutimas legi Esperantan literaturon. Espereble vi tamen havas kristnaskan ferion kaj tempon por komenci la legadon. Ekzistas ankaŭ dikaj romanoj en Esperanto, sed kompreneble estas pli facile komenci legi novelojn kaj mallongajn raktontojn. Ekzistas ankaŭ literaturaj revuoj en Esperanto, por tiuj kiuj volas legi pli multe. Romanojn, novelojn kaj poezion oni povas mendi kaj de Eldona Societo Esperanto (adreso ĉi-maldekste) kaj de la libroservo de Universala Esperanto-Asocio, www.uea.org

Agablan legadon
Via redaktoro

Plebejo trovas orsplenon

Daŭrigo de paĝo 1.

no konsistis el ramplantoj: ampelopo, kaprifolio, klematido, hedero; kaj ĝi estis tiel densa, ke eĉ ne guto da pluvo trairis.

Ekster la pordo staris abeluoj, sed anstataŭ abeloj loĝis en ili papilioj. Kaj kiam ili elsvarmis, tio estis vidindaĵo.

— Mi ne ŝatas suferigi abelojn, diris la viro. Kaj cetere ili estas tiel malbelaj: ili aspektas kiel vilaj kafgrajnoj, kaj ili pikas ankaŭ, kiel vipuroj.

Kaj ili eliris en la ĝardenon.

— Nun vi legos en la abocolibro de la naturo, vi ekscios la sekretojn de la floroj kaj la sentojn de la herboj. Sed vi ne rajtas demandi, nur aŭskulti kaj respondi... Vidu, infano; sur tiu griza ŝtono kreskas io, kio similas al grizpapero. Tio venas unue, kiam la roko malsekiĝas. La roko ŝimas; la ŝimo nomiĝas likenoj. Ĉi tie ni havas du specojn; unu similas al kornoj de boaco; ĝi ankaŭ nomiĝas boaclikeno, kaj estas la ĉefa manĝaĵo de la boaco. La alia nomiĝas islanda likeno kaj similas ... Al kio ĝi similas?

— Ĝi similas al pulmo, ĉar tiel estas skribite en la naturscienca libro.

— Jes, ĝi tra lupeo similas al la aervezikoj de la pulmo kaj el tio la homoj lernis uzi ĝin kontraŭ brustmalsanoj, vi sciu. — Sed nun, ĉar la roklikenoj kolektis humon, venas la muskoj. Ili havas iaspecajn simplajn florojn kaj ili semiĝas; ili similas al la glacifloroj sur la fenestrovitro, sed vi vidos, ke ili ankaŭ similas al eriko, kaj koniferoj kaj ĉio ebla, ĉar ĉiuj plantoj estas parencaj. Ĉi tiu plumomusko aspektas kiel piceo, sed havas semkapsulojn kiel papavo, nur pli simplajn. Sur la muskoj baldaŭ kreskas eriko. Se vi rigardas la erikon tra grandegiga lupeo, ĝi fariĝos epilobio, aŭ rododendro, same kiel ulmo, kiu nur estas granda urtiko. La humtapiŝo estas preta, kaj en la humo ĉio kreskas. La homo por sia utilo kaptis kelkajn plantojn, sed la naturo mem donis al li indikojn, kiujn li prenu kaj kiel li utiligu ilin... Tio ne estas pli stranga ol la ornamoj kaj koloroj, kiujn la floroj ricevis por diri al la insektoj, kie la mie-

lo troviĝas. Vi mem vidis la sekalan spikon, kie la bakista ilaro pendas ekstere kiel bakistŝildo. Kaj se vi rigardas la linon, la plej utilan el ĉiuj plantoj, ĝi mem instruis al la homoj ŝpini. Rigardu en la floron, kaj vi vidos la linfaskon, kie la pistiloj tordiĝas ĉirkaŭ la stiluso kiel stupoj ĉirkaŭ spindelo. Por esprimi sin pli klare la naturo igis parazititan herbeton nomata kuskuto volviĝi ĉirkaŭ la tuta planto, supren-malsupren, tien-reen kiel la navedo en teksilo. Strange estas, ke ne estis homo, sed papilio, kiu unue eltrovis, ke oni povas ŝpini la linon. Ĝi nomiĝas linvolvulo; kaj el la folioj ĝi ŝpinas per sia propra silko malgrandajn lulilkovrilojn kaj luliltukojn por siaj idoj. Sed deponi kiam oni kulturis linon, ĝi ruze atendas la tempon, tiel ke ĝiaj idoj estas flugpretaj tuj antaŭ ol la lino estas rikoltota.

Kaj la medicinplantoj, vi sciu! Rigardu tiun grandan papavon; fajre ruĝa kiel febro kaj frenezo! Sed je la fundo de la floro estas nigra kruco; tio estas la venensigno de la apotekistoj. Kaj meze en la kruco staras romia vazo kun sulketoj. Tiujn sulketojn oni tranĉetas, tiel ke elfluas la medikamento, kiu povas alporti morton, se erare uzata; sed povas alporti la ĝentilan fraton de la morto, la dormon, se uzata ĝuste. Jes, tiel saĝa kaj donacema estas la naturo. Sed nun ni rigardu la Orsplenon.

Ĉi tie li faris paŭzon por vidi, ĉu Plebejo fariĝas scivolema. Sed ŝi ne estis.

— Nun ni rigardos la orsplenon.

Denove paŭzo! Ne, Plebejo kapablis silenti, kvankam ŝi estis tre malgranda.

— Nun ni rigardos la orsplenon, kiu havas la florojn de alĉemilo kaj foliojn de saksifrago. Tio estas ĝia karakterizaĵo kaj ĝi diras, kie troviĝas fonto. La alĉemilo kolektas kaj roson kaj akvon en siaj folioj, ĝi estas mem malgranda klara fonto; sed Saksifrago krevigas rokojn. Sen rokoj vi ne havos fonton, kiel ajn longe for la roko estu. Tion diras la orspleno al tiuj, kiuj komprenas. Ĝi kreskas ĉi tie sur la insulo kaj vi ekscios pri la loko, ĉar vi estas ĝentila. El via maneto la riĉulo ricevos la freŝan akvon por sia seka animo, kaj per vi ĉi tiu insulo fariĝos benita. Iru en paco, infano mia. Kiam vi venos en la nuksarbaron, vi trovos dekstre arĝentan tilion; sub ĝi kuŝas angvizo, kiu ne estas danĝera. Ĝi montrus al vi la vojon al la orspleno. Sed antaŭ ol vi iros, donu kison al ĉi tiu viro, sed nur, se vi mem volas.

Plebejo etendis sian buŝeton al la viro kaj kisis lin. Tiam la vizaĝo de la viro ŝanĝiĝis, kaj li staris tie kvindek jarojn pli juna.

— Mi kisis infanon, mi ricevis juncon! diris la ĝardenisto; kaj vi ne ŝuldas dankon al mi. Adiaŭ!

Plebejo iris al la nuksarbaro. Tie

muzikis la arĝenta tilio kaj plue la burdoj kantis en la tilifoliaro. La angvizo tute prave kuŝis tie, sed ĝi aspektis, kiel se ĝi estus verdigrinta ion.

— Jen tie estas Plebejo, kiu ricevos la orsplenon, diris la angvizo. Vi ricevos ĝin, sed je tri kondiĉoj: ne klaĉu, ne mensogu, ne estu scivolema. Iru nun rekte antaŭen, kaj vi trovos la orsplenon.

Plebejo iris rekte antaŭen. Tiam ŝi renkontis virinon.

— Bonan tagon, diris la virino. Ĉu vi estis ĉe la ĝardenisto en Sun-maldensejo?

— Bonan tagon, sinjorino, respondis Plebejo kaj pluiris.

— Vi almenaŭ ne klaĉas, diris la virino.

Poste ŝi renkontis ciganon.

— Kien vi iras? la cigano demandis.

— Mi iras rekte antaŭen! Plebejo respondis.

— Vi almenaŭ ne mensogas! diris la cigano.

Poste ŝi renkontis laktoportiston. Sed ŝi ne povis kompreni, kial la ĉevalo sidas en la ĉaro kaj la laktokoĉero estas jungita ĉe la timono kaj tiras.

— Nu mi senbridiĝos, diris la koĉero kaj ekkuregis, tiel ke la ĉevalo falis en la vojfosojn ... Nun mi akvumos la sekalon, diris la koĉero kaj deprenis kovrilon de laktobotelo por akvumi la kampon.

Plebejo opiniis tion stranga, sed ŝi ne rigardis tiudirekten, sed pluiris.

— Vi ankaŭ ne estas scivolema, diris la laktokoĉero.

Kaj nun Plebejo staris apud roko; la suno brilis inter la avenuoj sur verdan strion de suka herbo, kiu brilis kiel plej pura oro.

Estis la orspleno; kaj Plebejo vidis, kiel ĝi sekvas la fontvejon de la roko en la riĉulan kampon.

Tiam ŝi falis surgenuje kaj kolektis tri orsplenojn, kiujn ŝi kaŝis en sian antaŭtukon; kaj kun ili ŝi hejmeniris al sia patro.

La dragono surmetis la kaskon, la sabron kaj la jakon; kaj ili iris al la pastro. Poste ili ĉiuj kuniris al la riĉulo.

— Plebejo trovis la orsplenon! la pastro diris, kiam li eniris tra la salonpordo. Kaj nun la tuta vilaĝo riĉiĝos, ĉar nun ni fariĝos banloko!

Kaj fariĝis banloko; venis vaporbato kaj komercistoj; establiĝis gastejo kaj poŝtoŝtanco, kuracisto kaj apoteko. Oro fluadis dumsomere en la vilaĝon, kaj estis la fabelo pri la orspleno, kiu povis krei oron.

August Strindberg
Tradukis: **Franko Luin**

Vortoj ne troveblaj en Plena Ilustrita Vortaro

plebejo	blåvinge, <i>plebejus argus</i>
orspleno	gullpudra, <i>chrysosplenium alternifolium</i>
empetro	kråkbär/kråkris, <i>empetrum nigrum</i>
ursbero	mjölon, <i>arctostaphylos uva-ursi</i>
lineo	linnea, <i>linnaea borealis</i>
boaclikeno	renlav, <i>cladina rangiferina</i> , "kadonio" en vortaroj
kuskuto	nässelsnärja, <i>cuscuta europaea</i>

Faktoro 15

Ŝi staras ĉefenestre turnante al li la dorson, rigardante foren al la maro. La fenestruoj estas malfermitaj, matena lumo verŝiĝas en la ĉambron, sur la plankon kaj ĝis la neordigita lito. La mara muĝado kaj laodoro de salo penetras per facila vento, tiel malforta ke ĝi apenaŭ levas ŝiajn harojn. Ŝi estas silueto kontraŭ la intensa lumo, ŝia dorso estas svelta kaj rekta. Ŝi kombas al si la harojn en la suno.

"Hodiaŭ sendube estos varme", diras la sidanto surlite.

"Mhm", ŝi diras kombante sin plu.

"Ni povus lui aŭton por veturi al Vai, tiu strando, vi scias."

"Se plaĉas al vi."

"Tamen eble estus tro varme en la aŭto?"

"Do ni fajfu pri la afero."

"Tro varme por vi, mi celas. Kion vi pensas?"

Ŝi duone turnas sin kaj ĵetas al li rigardon. Poste ŝi revenas al la ekstera vidaĵo.

"Faru kiel vi volas", ŝi diras. "Tion vi ja kutimas."

Dum kelka tempo li sidas senmova rigardante ŝian dorson en la kontraŭa lumo, ŝiajn movojn kiam ŝi ŝovas la kombilon tra la hararo. Poste li surmetas kakian ŝorton kaj verdan T-ĉemizon.

"Mi iros mendi kafon."

"Bone."

"Ni trinkos ĝin ĉi-ekstere, ĉu ne?"

"En ordo."

Post kiam li foriris, ŝi ĉesas kombi sin kaj paŝas en la mezon de la ĉambro. El sako staranta sur seĝo ŝi elserĉas libron, sunokulvitrojn kaj tubon da sunprotektilo. Ŝi metas la okulvitrojn surfrunte kaj staras dum kelka tempo turnite al la lito. Poste ŝi glatigas la littukon kaj eliras.

Ekster la fenestro kun bluaj fenestruoj mallarĝa teraso laŭiras la domon, inter blanka stuka muro kaj la kruta ŝtongarnita marbordo. La teraso rigardas orienten, kaj sur ĝi jam estas varme pro la suno. La mara akvo estas brunverda proksime al la tero, kaj pli fore blua ĝishorizonte. Sunaj rebriloj fulmas en la ondetoj.

Ŝi sidiĝas ĉe tableto kaj subenigas la sunokulvitrojn. Ĉi-ekstere en la suno ŝiaj duonlongaj haroj iĝas pale flavaj kaj la haŭto de ŝiaj nudaj ŝultroj alprenas rozan nuancon. Ŝi portas

bluan senmanikan robon kaj estas nudpieda. Sur ŝiaj brakoj kaj kruroj lanugoj brilas blanke.

"Jen via kafo", li diras. La tasoj tintetas kiam li surtabligas ilin. Li sidiĝas sur libera seĝo.

"Dankon."

"Mi timas ke hodiaŭ estos tro varme por aŭti."

Ŝi prenas gluton da kafo, kaj li faras same. Ondetoj batas la bordajn ŝtonojn subterase. Ekskursita ŝipeto debordiĝas fore en la haveno. Li ombas la okulojn permane kaj observas ĝin dum kelka tempo, poste li turnas sin al ŝi.

"Ĉu vi pensas ke ĝi estas tiu, kiu iras al Faneromeni?"

Ŝi tiras la ŝultrojn sed diras nenion.

"Ni povas resti surstrande ĉi tie, ĉu ne?"

"Certe."

"La antaŭan fojon ni ne kutimis eliri frumatene. Kelkfoje ni restadis enlite ĝis la lunĉo."

Ŝi rigardas al la horizonto penseme, sen vortoj.

Je ĉi tiu horo matene la strando estas maldense okupita de sunbanantoj. Ili baldaŭ trovas lokon kie restas sufiĉe da libera spaco ĉirkaŭe. Li komencas per rapida enakviĝo, dum ŝi plibonigas sian sunprotektan en kelkaj lokoj.

"Ĉu mi ŝmiru al vi la dorson?" li demandas, skuante de si la akvon kvazaŭ granda hundo.

"Dankon, ne necesas."

"Espereble vi jam surmetis sufiĉe? Vi scias, ke vi estas iom sentema."

"Vi povas esti trankvila."

Li gvatas foren laŭ la strando.

"Domaĝe ke ĝi tiom kreskis. Oni eĉ ne plu vidas kie finiĝas la hoteloj. Ĉu vi memoras kiam ni promenis laŭ la strando ĝis tiu vilaĝo? Ni povus ripe-ti tion. Nu, ne ĝuste nun, sed iutage. Se estos iomete malpli varme. La hoteloj ja devas finiĝi ie."

Ŝi elsakigas sian libron kaj foliumas ĝis ŝi trovas la kafejan kvitancon kiu servas kiel legomarko.

"Ĉiukaze la akvo ankoraŭ restas pura", li diras kaj sidiĝas sur sia bantuko.

Pli kaj pli da homoj alvenas sursable ŝarĝitaj per sakoj, tukoj kaj strandaj matracoj. Du palaj junuloj komencas piedpilki apud ili. Aliflanke sidiĝas anhelanta greka patrino kun du

adoleskaj filinoj en bikinoj. Ŝi disdonas fruktojn, admonojn kaj sunĉape-lojn al la knabinoj. Li turnas sin por ne rigardi tien.

"Simple rigardu plu. Tio ne estas malpermesita."

Li rigidiĝas kaj ekhavas pli malmolan mienon ĉebuŝe.

"Nun vi tamen diras sensencaĵon", li diras mallaŭte.

"Kial do? Sed tiun duopon vi kredeble povos nur rigardi."

Dum kelka tempo li diras nenion sed observas ŝin, ŝajne dum streĉa pensado. Ŝi ne levas la rigardon sed relegas la saman paĝon en sia romano de Coelho.

"Nu, ili estas beletaj, sed eble tro dikaj por vi", ŝi pluas. "La kruroj ne tiel sveltas kiel la ŝiaj."

Du aĝaj sinjorinoj en bankostumo, ĉapelo kaj mansako staras enakve kvin metrojn de la tero, kie ili vigle diskutas en ia germana dialekto.

Li klinas sin antaŭen al ŝi.

"Tio neniam signifis ion ajn, vi scias ja. Mi komprenas ke mi faris diablan eraron, sed pasis jam pluraj monatoj! Tio signifis al mi nenion!"

"Kredeble vi tute pravas. Jen la idodamna afero", ŝi diras malserene.

Li suspiras kaj glatumas al si la verton. La haroj jam sekiĝis kaj brule varmas.

"Mi ne scias pri kio vi babilas", li diras. "Ĉu estus pli bone se..."

Mola pilko trafas lian dorson ŝutante sablon sur liajn krurojn.

"Sorry, sir!" Unu el la dekkeljaraj paluloj alkuras por kapti sian pilkon.

"No problem."

Li okulsekvas kiam ili foriras je kelkaj paŝoj kaj rekomencas dribli. Unu el ili resaltigas la pilkon tenante ĝin daŭre en la aero.

Ŝi sidiĝas, tenas fingron en la libro kaj gapas foren al Egea Maro.

"Al mi tio tamen signifis ion", ŝi diras ne rigardante lin.

"Bone, mi komprenas, sed kion mi faru? Tio okazis. Mi dezirus ke mi povus malfari ĝin, sed tio ne eblas. Kiom da tempo vi intencas fosadi en tiu afero? Ni reiris ĉi tien por rekomenci kaj iri pluen, ĉu ne?"

Ŝi turnas sin al li kaj renkontas lian rigardon.

"Mi supozas ke tio signifis ion ankaŭ al ŝi. Ĉar ŝi daŭrigis telefoni. Ŝajne do nur al vi tio signifas nenion. Tio estas absurda!"

Refoje li palpas al si la hararon. La sinjorinoj kun mansakoj paŝis du-tri metrojn pli foren tiel ke la akvo jam atingas iliajn genuojn.

"Eble ŝi plu sendas mesaĝojn. Ĉu tial vi ne plu metas la poŝtelefonon kien ajn?"

Li ĵetas rapidan rigardon al la stako da vestaĵoj apud si kaj poste turnas sin for, al la strando kaj maro.

"Iĝas varmege", li diras post iom. "Ĉu vi ne banos vin? Mi povus peti tiujn pilkulojn ke ili ĵetu okulon al niaj aĵoj."

"Ne dankon. Sed bonvolu bani vin, se estas tro varme por vi."

Li rigardas ĉirkaŭ si, tamen restas sidanta. La patrino kaj la knabinoj nun ekhavis akompanon de juna viro proksimume 20-jara, kiu ankaŭ ricevas fruktojn. Glaciaĵo-vendisto malrapide alproksimiĝas vendante laŭ la strando.

"Mi nur ŝatus scii", li komencas, sed eksilentas gapante suben al la sablo.

Ŝi rigardas lin unuafoje en longa tempo sed diras nenion. Ŝia vizaĝo estas glata kaj neŭtrala. Proksime al ŝia orelo lobo troviĝas blanka makulo el neŝmirita sunkremo.

"Mi tuj komprenis pri kio temas vidante tiun krurulinon. Ŝian diablan rigardon al vi. Kiom ŝi aĝas, efektive? Kiomfoje vi renkontiĝis?"

"Mi jam pardonpetis", li provas.

"Mi dezirus ke vi povus kompreni."

"Mi dezirus ke komprenus vi", ŝi rapide respondas. Eta sulko aperis inter ŝiaj brovoj, iomete super la sunokulvitroj.

"Kion do mi komprenu?"

Ŝi iom prokrastas respondi, turnas sin kaj rigardas la du malblondajn knabinojn.

"Eble ke ĉio signifas ion. Kaj ke ne eblas revojaĝi."

La glaciaĵo-vendisto jam preterpasis ilin. La tri grekaj gejunuloj vikle diskutas ion dum ilia patrino kroĉotrikas. La sinjorinoj kiuj staris enakve jam malaperis. Li ĵetas rigardon al la horloĝo. Estas la dekmua kaj duono.

"Ĉu ni ne banu nin antaŭlunĉe?"

"Ni vidos."

"Eble ni povus lui tian pedalboaton", li proponas. "Tiel vi venus sur la akvon sen solvi la sunkremon."

Ŝi kuŝas surventre kaj legas sian libron. Li rigardas ŝiajn brunajn dorson kaj krurojn, kiuj estas tute senmovaj. La rozaj plandoj estas turnitaj al li. Ŝia

bikino flavas kontraŭ la bruno. Surkape ŝi portas pajloĉapelon kiu ombbras la nukon, sed la ŝultroj situas en suno kaj brilas ruĝe. En la ombro de ŝia ŝultrosako kuŝas botelo da minerala akvo kaj la tubo kun sunprotektilo, faktoro 15. De la akvorando aŭdiĝas infanaj voĉoj kaj plaŭdado.

Li stariĝas, alpaŝas kaj genuas apud ŝi sursable. Ŝi ekrigardas lin sed tuj revenas al sia libro. Li prenas la tubon, elpremas sufiĉan kvanton kaj komencas ŝmiri ŝiajn ŝultrojn. Unue la dekstran, poste la maldekstran. Ŝi klinas la kapon suben kaj mane ŝovas la harojn flanken. Neniu el ili diras ion.

Poste li alŝraŭbas la ĉapon de la tubo, paŝas malrapide tra la sablo en la maron. Ŝi turnas la kapon kaj vidas lin naĝi eksteren inter pedalboatoj kaj ludantaj infanoj, ĝis orangkolora buo kaj poste reen. Kiam li alproksimiĝas al la tero ŝi turnas folion de la libro kaj legas plu.

Sten Johansson

LIBRO-RECENZADO

Sugestoj por komentado de alies tekstoj

Ĉu vi iam havis la taskon recenzi libron por revuo? Aŭ ĉi iu konato demandis de vi kion vi opinias pri lia aŭ ŝia novelo aŭ poemo? Sendepende de la kialo kial vi komentas alies verko, tiuj ĉi konsiloj povas esti utilaj al vi. Verkis ilin Anna Lowenstein, esperantista verkistino.

Ĝeneralaj konsideroj

Tro akraj kritikoj povas malkuraĝigi aŭ eĉ komplete detruji ies verkemon. Respektu la sentojn de la verkinto, kiu kuraĝe invitis viajn komentojn. Tio ne signifas, ke vi ne rajtas mencii la detalojn, kiuj ne plaĉas al vi, sed faru tion laŭ taktoplena maniero kun emfazo sur la pozitivaj trajtoj de la verko.

Necesas respekti ankaŭ la specon de verko, eĉ se ĝi apartenas al ĝenro, kiu ne plaĉas al vi. La demando ne estas, ĉu vi persone ŝatas la verkon, sed ĉu ĝi estas sukcesa en tio, kion ĝi celas fari.

Simile, ni ne deziras enplekti en diskutoj pri la dezirindeco de neologismoj. Eble la verkinto havas alian opinion ol vi. La demando ne estas, ĉu

vi konsentas pri ŝia aŭ lia aliro, sed ĉu ĝi estas bone farita.

Verkado estas unu afero – la kono de Esperanto estas alia. La celo de la komentado ne estas korekti la lingvouzon. Tamen, povus esti utile korekti bazajn aŭ persistajn erarojn. Se verkinto faras multajn erarojn, menciu nur la plej gravajn.

Kiel komenti

Kio estas via ĝenerala impresio de la verko tuj post la legado? Kia estas ĝia etoso?

Kio laŭ vi estas la celo de la verko? Kiel ĝi realigas tiun celon?

Nomu iujn detalojn aŭ pli ĝeneralajn aspektojn de la verko, kiuj aparte plaĉas al vi. Ĉu vi povas klarigi kial ili plaĉas?

Ĉu estas iuj detaloj aŭ pli ĝeneralaj aspektoj de la verko, kiuj laŭ vi ne estas sukcesaj? Ĉu vi povas klarigi kial? Ĉu vi havas sugestojn por plibonigi la verkon?

Stilo: ĉu la verkinto preferas simplan stilon aŭ pli ellaboritan, ĉu la vortelekto estas taŭga, ĉu la frazoj es-

tas bone konstruitaj?

Vi rajtas mencii eventualajn bazajn aŭ persistajn erarojn en Esperanto. Memoru tamen ke la celo estas komenti pri la verko, ne korekti ĝin.

Anna Lowenstein

Signoj dum ŝtormo

Kiam Lupo atingis dekunuan kaptoŝnuraron li sentis ke la sunlumo varmigas la vangon. Tio okazis por la unua fojo post la vintromezo, kaj tio ĉiujare estis aparta okazaĵo, ĉar post la reveno de la suno post la mezvintura mallumo tio estis aparta memorigo ke la printempo estas survoje. Pri tio verŝajne pensis ĉiuj klananoj hodiaŭ, sed Lupo pensis pri tio ankaŭ pro aparta kialo: Lia patrino rakontis ke la tago, kiam li naskiĝis, estis ĝuste la unua tago post mezvintro, kiam la suno varmigas la vangon. Patrino diris ke la pragepatroj ĉiam diris ke bebo, kiu naskiĝas en aparta tago alportas feliĉon al la klano. La unua tago de suna varmigo estis tia aparta tago.

Lupo pensis ke li nun havas dek tri jarojn. Tio estas la sama nombro kiel la nombro de klananoj, loĝantaj en la domo sur la terkolo. Pri lia naskiĝo lia patro rakontis alian aferon. La tagon antaŭe li estis ĉasanta en la arbaro. La ĉasado ne tre bone sukcesis, kaj finfine li perdis sian lastan sagon, mistrafinta leporon. Ĉar komencis krepuskiĝi, li devis eskii hejmen. Post nur ioma skiado li rimarkis ke lupo iras malproksime je lia dekstra flanko. Se li havus sagon, li tuj pafus ĝin, sed sagoj ja mankis. Baldaŭ li rimarkis ke lupo iras ankaŭ je lia maldekstra flanko, antaŭ li kaj malantaŭ li. Tute silente ili iris ĉirkaŭ li preskaŭ ĝis la domo sur la terkolo. Tial la patro de Lupo opiniis ke la lupoj estos protektantoj de lia filo, kiu ricevis la nomon "Lupo".

Se naskiĝus knabino, ŝi tamen ne povus havi la nomon "Lupo", ĉar knabinoj en la tribo ĉiam havis nomojn de plantoj aŭ arboj. Nur knaboj povis porti nomojn de bestoj. La triboj de la gento ricevis siajn nomojn de astroj. Pro tio la tribo de Lupo nomiĝis "nordlumo". La alia tribo sur la alia flanko de la rivero nomiĝis "stelo".

Ĉi-matene Lupo eskiiis por kapti lagopojn per kaptoŝnuroj, faritaj el tendenoj aŭ el maldikaj strioj el haŭto. Antaŭ du tagoj li skiis la saman rondon aranĝante la kaptoŝnurojn tie, kie lagopoj serĉadas manĝaĵon. Hodiaŭ li jam traserĉis dek unu kaptilarojn, kaj nun li portis sep lagopojn pendantajn je la zono ĉirkaŭanta la pelton.

La sekvonta kaptoŝnuraro ne estis en la valo, sed sur la deklivo de la monto. La kaptŝnura rondo daŭras

sur la monto. La lastaj kaptoŝnuroj sekvos je la alia flanko de la monto kaj sur la vojo reen al la domo. La longeco de la rondo estas ĝuste tiel longa ke oni povas skii la tutan vojon en unu tago. La triboj ĉiam esperplene atendas la traserĉinton. Se abundas lagopoj ĉirkaŭ lia zono, la tagon poste estos lagopa festeno. Fiŝaĵo, alkaĵo kaj boacaĵo certe bongustas, sed lagopaĵo estas eĉ pli bona.

Lupo komencis grimpi la monton kun la skioj etenditaj disen. La leviĝo sur la monton estis la plej laciga parto de la rondskiado. Sur la alia flanko de la monto tamen troviĝas la plej bonaj kaptetoj. Lupo ĝojis ke li ricevis novan pelton. Antaŭ unu jaro li komencis kreski tiel rapide, ke panjo kundudris novan pelton por li el preparitaj boacaj feloj. La pelto estis tiel farita ke ĝi ĝuste almetiĝis al la korpo kiam li ne moviĝis. Kiam Lupo skiis la pelto male enlasis aeron tiel ke la ŝvito ne fluis sur lia korpo sed forvaporigis. Ne nur lia altiĝinta staturato, sed ankaŭ aliaj ecoj de lia korpo montris ke li ne plu estas knabo, sed viro. Pro la korpaj ŝanĝiĝoj la plej aĝa viro instruis al li la sekretojn, kiujn devas koni nur la viroj. Maljuna Falko rakontis al li kiel la ĉefdio kreis la mondon en la pratempo kaj kiel la kvar triboj de la ĉiela gento – la nordluma, stela, suna kaj luna triboj – antaŭ longa tempo alvenis al la lando de apud la rivero. Falko promesis al Lupo ke li en la ventonta somero povos partopreni la tutgantan renkontiĝon kiel viro. Li ankaŭ rakontis ke ekzistas aliaj gentoj, kiuj parolas nekompreneble, kaj li ankaŭ diris ke Lupo, se li iam renkontas anon de alia gento devas levi siajn manojn alte por montri ke li ne tenas armilon, kaj ne estas malamika. Oni tamen ne kontaktiĝu al anoj de aliaj gentoj. Finfine Falko rakontis al Lupo kion devas fari viro al virino por ke lia infano komenci kreski en ŝia utero. Lupo opiniis ke la lasta informo estis la plej ĝena, kaj li dubis ke li iam kuraĝos fari tion. Post la iniciado Lupo ricevis sian unuan taskon kiel viro: tute sola rondskiu por aranĝi la kaptoŝnurojn kaj post du tagoj skii por kolekti la lagopojn el la kaptoŝnuroj. Antaŭ la foriro li ricevis la novan vestaĵon.

Leviĝante sur la monto Lupo rimarkis ke la suno ne plu varmigas lian vizaĝon, sed ke nuboj nun kovras la ĉielon kaj ke ekblovigita vento kaj ek-

falis neĝeroj. Li maltrankviliĝis, ĉar se neĝo abunde falas estas malpli facile trovi la kaptoŝnurojn. Tial li streĉis siajn fortojn por pli rapide trovi la restantajn kaptilojn. Li pensis ĉu li eble reskiu al la domo la plej mallongan vojon. Eble estos neĝa ŝtormo, kaj pro tio malfacilos trovi la vojon hejmen. Ne, li ne volis reskii, ĉar estis la unua fojo, kiam li tute sola skias la kaptoŝnuran rondon. Estis lia ŝanco trovi al ĉiuj ke li fariĝis viro. Se li revenus, certe neniu ridus, sed patro hontus ke lia filo ankoraŭ ne kondukas kiel viro. Estis pli bone daŭrigi. Lupo sciis kie oni devas leviĝi sur la deklivo kie la neĝotavolo ne estas tro dika. Per la skibastono li mezuris la profundecon de la neĝo antaŭ ol pluskii. Tiel li klaf-ton post klafto pluskiiis. La vento rapide plifortiĝis kaj la neĝoj falis pli abunde. Lupo preskaŭ ne vidis la pintojn de siaj propraj skioj. Li komprenis ke jam estas tro malfrue reskii al la domo, kaj elkore pentis ke li ne komencis reskii tuj kiam li ekhavis tiun ideon. De la pli aĝaj viroj li lernis ke ekzistas du eblecoj travivi neĝoŝtormon. Unu ebleco estas fosi truegon en la neĝo, kovri la truegon per sledo – se oni tiun havas – aŭ per la skioj kaj haŭto – se oni tiujn havas, aŭ per sia propra pelto – se oni kunportis rezervajn vestaĵojn. La alia ebleco estas trovi iun el la ĉaskabanoj, kiuj troviĝas dise en la arbaroj. Antaŭ multaj jaroj li iam tranoktis en ĉaskabano kune kun patro. Ĝi situas ie sur tiu ĉi monto, sed ĉu estas eble trovi ĝin kiam estas neĝoŝtormo? Lupo dubis, sed ne estis alia ebleco. Kie oni povas trovi ĝin? Ĉu ne iom maldekstre ĉe la arbarrando? Kie la betuloj ĉesas kreski, ĝi estis konstruita por ke oni de tie facile povu vidi kiam boacaro kuras sur la monto.

La tavolo de mola neĝo nun estis tiel dika ke ne plu eblis gliti sur la skioj. La skioj tamen ebligis ke Lupo povis iri sur la neĝsurfaco sen kaptiĝi en la neĝo. Paŝon post paŝo li iris. Lupo komencis timi ke li eble mortfrostos en la neĝo, sed li tamen memoris ke antaŭ multaj jaroj la ĉaskabano estis ie proksime.

Kaj subite... lia skibastono tuŝis rondan kabanon el maldikaj branĉoj kaj musko. Tie ĝi estis! Se li nur skiis iom pli dekstre li trapasus la kabanon kaj frostemortus en la neĝo. Feliĉe li trafis ĝuste la kabanon. La pordfelo ne estis videbla. Lupo demetis la ski-

ojn. Per la manoj li komencis forfosi la neĝon de la loko, kie la pordofelo devis esti. Baldaŭ li sentis ke io moviĝis antaŭ liaj manoj. La felo. Li kliniĝis antaŭen kaj grimpis en la kabanon. Tie li ĉirkaŭrigardis. Sur la tera planko kuŝis malnovaj folioj kaj feloj – ĝuste kiel Lupo memoris – sed ankaŭ io alia: juna viro iom pli aĝa ol li mem. Lupo kaŭris sur la planko kaj dum longa tempo nur rigardis la viron. Li portis pelton similan al tiu de Lupo. Ĉirkaŭ sia kolo li tamen portis ledan ŝnuron kun kelkaj bestaj dentoj. Sur lia frunto estis ruĝaj strioj, verŝajne pentritaj per samspeca farbo, kiun uzis la ĉiela gento por pentri bildojn sur rokoj. La viro kuŝis tute silenta, sed li ne dormis. Li rigardis Lupon per grandaj okuloj. Subite Lupo ekmemoris kion diris al li Falko kaj salutis la viron per malfermita mano. Same faris la alia viro. La viro malrapide sidiĝis. Ambaŭ restis silentaj. Post ioma atendo Lupo diris:

“Mi estas Lupo, filo de Alko, de la nordluma tribo, de la ĉiela gento.”

La viro rigardis Lupon kun miro. Poste li diris frazon, proksimume same longan kiel tiun de Lupo, sed la sonoj signifiis nenion. Kelkaj sonoj kiel la blekado de birdoj, aliaj kiel la susuro de la vento en la aŭtunaj folioj. Lupo unue miris ĉu la fremdulo volas insulti lin, sed baldaŭ li ekmemoris kion iam diris Falko. Anoj de aliaj gentoj parolas malĝuste, sed ili tamen povas kompreni unu la alian. Strange!

Ĉar la fremdulo ŝajne ne komprenis ĝustan paroladon, Lupo denove montris sian malfermitan manon. La fremdulo faris same kaj ridetis. Ankaŭ Lupo ridetis. Bone, ili ridetas same kiel la ĉiela gento. La rideton oni ja povas kompreni: mi komencas fidi vin. La malfermitajn manojn ambaŭ komprenis jam antaŭe: Mi ne uzos armlilon kontraŭ vi.

Subite Lupo ekhavis ideon. Imagu ke oni povus inventi ankaŭ aliajn signojn, tiel ke li kaj la fremdulo povus interkompreniĝi plu. Lupo fingromontris al unu el la lagopoj kaj poste al la buŝo de la fremdulo: Ĉu vi volas manĝi lagopon? La fremdulo altigis unu fingron. Lupo ne komprenis. Post hezito la fremdulo montris al lagopo kaj al sia buŝo: Jes, mi volas manĝi lagopon. Lupo forigis unu lagopon el sia zono kaj donis al la fremdulo. Tiu tuj akceptis ĝin kaj komencis entuziasme forigi la plumojn. Li eĉ ne finfaris la deŝiradon, sed baldaŭ ekmanĝis la krudan birdon. Lupo komprenis ke li estas ege malsata. Lagopoj pli bone gustas rostitaj, sed se ne eblas rosti, oni povas manĝi ilin krudaj.

Kiel oni do povas diri sian nomon? Kiam la fremdulo finmanĝis kaj lekis siajn fingrojn, Lupo montris per fingro al sia brusto kaj hurlis kiel lupo. La fremdulo ridetante hurlis kaj montris per fingro al Lupo. Poste li

fingromontris al si mem kaj levis siajn manojn antaŭ la kapo. Per la fingroj li ŝajne imitis boacajn kornojn. Lupo ridetis. Li komprenis ke la fremdulo nomiĝas Boaco. Li ripetis la signon kaj fingromontris al Boaco.

Lupo fervoriĝis. Kion pli li volas diri? Kiel diri ke li ĵus fariĝis viro? Ne... ne eblas tion diri. Ĉu eblas diri ke li rondsikiis por kolekti lagopojn el kaptoŝnuroj? Lupo desegnigis rondon sur la maldika neĝotavolo sur la planko apud la pordo. Li rimarkis ke Boaco ŝajnas kufuzita. Lupo montris al la lagopoj pendantaj ĉe sia zono, kaj disetendis siajn dek fingrojn dufoje. Nun Boaco ridetis. Ŝajnis ke li komprenas ke Lupo rondsikiis por kolekti lagopojn en dudek lokojn. Nun estis la vico de Boaco. Li denove altigis siajn manojn super sian kapon, sed nun en iom alia maniero ol antaŭe. Lupo komprenas li signas alkon. Boaco tiam montris al sia pafarko, kiu pendas ĉe lia sino. Nun Boaco per siaj dekstraj montraĵoj kaj longaj fingroj imitis kurantan homon. Per sia buŝo li komencis blovi al la fingroj, kiaj fine li fingromontris al la pordofelo de la kabano. Lupo komprenis: Boaco ĉase postskiiis alkon. Komenĉiĝis neĝa ŝtormo, kaj li serĉis protekton en la kabano.

Lupo estis tiel feliĉa ke li volis danci, sed dancado tute ne eblis en la malgranda kabano, kie eĉ ne eblis stariĝi. Nur unu penso plenigis lin: Kion pli oni povas signi? Per ambaŭ manoj li imitis du mamojn kaj montris ses fingrojn: Estas ses virinoj en nia domo. Per unu fingro li signis viran membron kaj montris sep fingrojn: Estas sep viroj en la domo. Boaco respondis: ok viroj kaj naŭ virinoj. Dum la tuta vespero ambaŭ inventis novajn signojn. La intersignado temis pri la nombro de domoj en iliaj triboj, la nombro de triboj en iliaj gentoj, la nomoj de la gentoj, kiom da jaroj ili havas, kion ili kutimas manĝi. Kiam Boaco demandis ĉu Lupo jam havas edzinon kaj infanon, Lupo sentis intensan varmon sur siaj vangoj, kaj komprenis ke li ruĝiĝis pro la demando. Boaco komencis ridegi. Lupo unue hontis, sed kiam Boaco ne ĉesis ridi, ankaŭ Lupo finfine komencis ridi tiel multe ke eĉ larموj komencis flui sur liaj ruĝiĝintaj vangoj.

Malfrue en la vespero, kiam jam estis tute mallume, la du viroj ekdormis sur la malnovaj feloj en la kabano. En la matena krepusko ili vekigis kaj ĝoje salutis. Lupo regalas Boacon per lagopo, sed ambaŭ komprenis ke ili devas baldaŭ disiri, ĉar la suno brilis kaj la ŝtormo ĉesis, kaj ambaŭ volis atingi siajn hejmojn en la sama tago. Ili eliris tra la pordo, surmetis siajn skiojn, rigardis unu la alian kaj ridetis. Lupo prenis iom da neĝo en sia mano, ĵetis ĝin en la aeron kaj montris al si mem, al Boaco kaj fine al la kabano. Boaco komprenis: Se okazos

nova neĝoŝtormo ni renkontiĝos en la kabano. Li rapide ĉirkaŭbrakis Lupon kaj komencis skii orienten. Lupo komencis skii okcidenten.

Post la lagopa festeno, Lupo komencis instrui al la klananoj la lingvon intergentan.

Leif Nordenstorn

Unua premio en Belartaj Konkursoj de UEA 2005, branĉo "prozo".

LIBROJ

Tri infanlibroj

Dipika. Knabino el Sri-Lanko. Tapori. Genève. 2006. 14 paĝoj.

Matuteo. Infano el Latina Ameriko. Tapori. Genève. 2006. 14 paĝoj.

“Dipika, knabino el Sri-Lanko” kaj “Matuteo, Infano el Latina Ameriko” estas malgrandaj kaj simplaj laŭforme, sed interesaj enhave. Dipika vendas loteriajn biletojn por enspezi monon. La knabo Matuteo preparas glaciaĵon. En ambaŭ libroj okazas kaj agrablaj kaj malagrablaj aferoj. En ambaŭ libroj legado de libroj tamen havas gravan rolon. La libroj celas komuniki al la leganto ke legado kaj edukado estas grava ankaŭ por infanoj en tiuj landoj, kie infanoj devas labori.

La libroj estas optimismaj pro tio ke ili montras ke ankaŭ malriĉaj infanoj povas multon fari por ŝanĝi sian situacion.

La ilustraĵoj estas simplaj kaj belaj. La lingvaĵo estas simpla, sed ne malriĉa. La literotipo estas sufiĉe granda. La libroj estas interesaj kaj por infanoj ekde 8-jaraj ĝis plenkreskuloj. Ili ankaŭ estas bona legaĵo por komentantoj.

Ansereto vojaĝanto. Elena Popova. Eldonejo Matador. 2006. 32 paĝoj.

Jen rakontoj skribitaj por distri infanojn. Ŝajnas al mi ke la ansereto Ansi, kiu volas esplori la mondon, iel similas al scivolema infano. Ĝuste tiu scivolemo plaĉas al mi ĉar ĝi memorigas min pri infana scivolo, kiu estas pozitiva fenomeno. La ansereto renkontas diversajn bestojn kaj naturajn fenomenojn, kiuj laŭ fabla maniero ĉiuj vivas. Tiel la verkistino ankaŭ sukcesas. Ŝi distras. La libron ilustras kelkaj infanaj desegnaĵoj.

Laŭ enhavo la rakontoj estas por 4-8-jaruloj. La libro estas 30-paĝa, dense presita kaj kun malmultaj bildoj. La frazoj bedaŭrinde estas tro longaj kaj komplikaj por ke la libro vere estu komprenebla por infano.

Ĝenas la legado multaj preseraĵoj, lingvaj eraroj kaj esprimoj, kiuj ne Daŭrigo en paĝo 8.

La kernproblemo de d-ro Plutonio

„Do, la kernproblemo estas...“ ekde-
mandis la ĵurnalisto, sed la renoma
profesoro, fifame konata kiel „d-ro
Plutonio“, interrompis lin tuj.

„La kernan problemon vi ĵurna-
listoj neniam vere komprenis. Ne tem-
as pri tio ke mi estus „misanthropo“,
aŭ ke mi „subtenus teroristajn aga-
dojn“, aŭ iu alia stultaĵo pri kiu vi
klaĉgazetaristoj min akuzas. La kerna
problemo, mi refoje emfazis, estas
pure scienca. Neniu el la akuzoj kon-
traŭ mi travivus scienca ekzamena-
don.“

„Nu, jes, ja...“ provis la ĵurnalisto,
ne tre inteligente, enŝovi, „sed... nu...
tio kion vi proponas pri, nu, hm, ...
neniigi la tutan homaron...“

„Kaj do? Montru al mi ekzakte kie
mi porparolus ion tian. Vi ne trovas
ajnan pruvon por tia aserto.“

„Nu, eble ne ekzakte *porparolis*,
sed vi ja ĉiuokaze priskribis, sufiĉe
detale kaj antaŭ granda publiko, kiel
oni procedu por venen...“

„...venenigi la tutan homaron sur-
tere per plutonio. Jes. La publiko estis,
bedaŭrinde, ne tiel granda kiel mi
deziris, sed por miaj celoj sufiĉis. Ke
mi esploris la demandon plejble det-
ale, tio estas memkomprenebla por
mi kiel sciencisto – alie mi neniam
estus prezentinta miajn trovojn en la
Monda Kongreso pri Kernfiziko kiel
mi faris. Estas mia profesia devo trakti
sciencan hipotezon tiel – kaj ja estas
nenio alia ol scienca hipotezo pri kio
ni parolas. Mi neniam *porparolis* ion
ajn ĉi-riilate. Kaj cetera ne estis mi kiu
prezentis tiun hipotezon; estis mi kiu
sciencas kaj ekzakte *malpruvigis* ĝin.“

„Jes, ĝuste, tiu kiu prezentis la hi-
potezon...“

La severa profesora vizaĝo fariĝis,
se entute eblis, ankoraŭ iom pli seve-
ra. „...estis mia alte!! respektinda!! kol-
ego profesoro d-ro Johnston de Stan-
fordo.“

La juna ĵurnalisto eksilentis pro
surprizo. Li konis la aserton ke akade-
miuloj uzis la esprimon „mia alte!!
respektinda!! kolego“ ekskluzive por
siaj plej akraj rivaloj en la universita-
ta kariero, sed neniam antaŭe li aŭdis
iun uzi tiun vortumon en la vera vivo.
„Profesoro Johnston menciitis en po-
pularscienca eseo ke kelkaj gramoj da
plutonio estus sufiĉaj por, kiel li diris,
„venenigi la tutan homaron.“ Li, kiu
ĉiam estis paŝon antaŭe! Li, kiu ĉiam
volas estis la plej bona! Li, kiu alie ne-
niam asertas ion kion li ne povas

pruvi per siaj teorioj, kaj neniam
eblas trovi eraron en ili!“

„Jaha, kaj do, vi esploris lian aser-
ton...“

„Lian hipotezon. Li prezentis
konstaton, en sia sciencista agado,
kaj do mi devas povi konsideri tion
scienca hipotezo. Mi esploris lian hi-
potezon kaj trovis ĝin erara. Kaj do,
kiam oni petis min fari la inaŭguran
prelegon por la Kongreso pri Kernfizi-
ko – kiu estas granda honora tasko! –
pri scienca demando laŭ mia propra
elekto, tiam mi prezentis miajn tro-
vojn, kun ĉiuj miaj detaloj, kiuj kune
formis senmakulan pruvon. Ĉio ĉi tio
estis tute korekta kaj scienca agad-
maniero.“

„Kaj en tiu via prelego vi do aser-
tis, hm, ne, pardonu: vi do *pruvigis sci-
ence* ke ne eblas nenigi la homaron
per plutonio? Ĉar plutonio ne estas
tiel venena kiel profesoro d-ro John-
ston diras?“

„Plutonio estas ekzakte tiel venena
kiel mia alte!! respektinda!! kolego di-
ras. Neniu ĝis nun ŝancelis liajn tro-
vojn ke oni bezonas 0,17 mikrogram-
ojn da plutonio por elvivigi plen-
kreskan muskardenon, 3,42 mikro-
gramojn por elvivigi normalpezan
homon en la meza socia tavolo, kaj
6,02 mikrogramojn por sibiria long-
hara mamuto (tio ĉi-lasto sub la su-
pozo ke eblas re-kloni tian el antaŭ-
historia DNA). La malforteco en lia hi-
potezo estas en lia vortumo pri „kel-
kaj gramoj“ kaj „tuta homaro“, kaj
plue – la tuta logistiko.“

„Logistiko?“

„Jes – la tuta infrastrukturo kiu ne-
cesas, la organizado kaj strukturado!
„Venenigi la tutan homaron“, tio es-
tas facile por laiko diri, sed ĉu iu iam
vere trapensis kiel realigi ĉion tion en
la praktiko? Disdividi tiujn „kelkajn
gramojn“ en porciojn kun 3,42 mik-
rogramoj ne estas tre facile, sed ĉiu-
kaze estas fareble. Sed, kiel oni certi-
gu ke ĉiu homo surtere ricevu sian
porcion? Se oni forgesas nur unu etan
nekonatan tribon en la amazona
ĝangalo, oni ja ne „neniigas la tutan
homaron“, aŭ ĉu? Kaj kiomaniere oni
transportu ĉiun tiun, treege dan-
ĝeran plutonion disen al la tuta ho-
maro sen ke tiuj kiuj transportas ĝin
mem venenigu kaj mortu – t.e. mor-
tu tro frue? La tuta organizaĵo kiu
provus „neniigi la tutan homaron“
devus ja altgrade protekti sin mem
por povi plenumi sian riskan taskon –

tiel longe ĝis ĝi finfine nenigos sin
mem, ankaŭ per plutonio, alie ĝi ja ne
estus plenuminta sian taskon, aŭ
ĉu?“

„Sed kiuj estas tiuj pri kiuj vi paro-
las, kiuj havas tiajn terurajn planojn?
Kial iu volus fari ion tian?“

„Mi ne diris ke iu provas fari tion,
kaj mi havas nenium ideon kial iu en-
tute volus fari tion. Ne pri tio temas,
sed nur pri tio ĉu entute tio estus *ebla*
– temas pri scienca hipotezo. Mi neni-
am demandis ĉu la celo mem estas
dezirinda aŭ ne. Mi esploris ĉiujn mi-
litistajn kaj teroristajn strategiojn kiuj
imageblas por atingi tiun celon kaj
prezentis ilin en mia prelego, kaj mi
konstatis: eĉ ne unu el ili povas ga-
rantii ekstermon de la homaro je ple-
naj 100%.“

„Sed mi ankoraŭ ne komprenas
vian veran celon. Ĉu vi volas ekster-
mi la homaron, aŭ ne?“

„Ekstermi la homaron aŭ ne, kiel
tio tuŝas min? Tio ja estas ĉiuokaze ne
ebla (almenaŭ ne je pli ol 99,86% en
la plej bona kazo, kiel mi nun pruvigis).
Tio kion mi volas estas: finfine povi
malpruvi mian alte!! respektindan!!
kolegon profesoron Johnston. Ha, se
vi estus vidinta lian vizaĝon, kiam li
sidis tie en la unua vico, kaj mi mont-
ris punkton post punkto kiel li mal-
pravas!“

„Nu, do la kernproblemo, kiel vi
nomas ĝin, estas solvita nun, ĉu ne?“

„Fakte ne. La kerna problem es-
tas...“ Kaj subite ĉiu energio forlasis la
konatan profesoron, kvazaŭ aero pi-
kitan balonon.

„La kerna problem estas – ke oni
neniam plu invitos min al iu scienca
konferenco.“

Martin Weichert

*Unua premio en Belartaj Konkursoj de
UEA 2003, branĉo „prozo“.*

Daŭrigo de paĝo 7.

estas bona Esperanto, ekzemple ella-
so de subjekto: „Preter la vilaĝo fluus
reivereto. Estis malprofunda...“ (p.1).
Estas bona regulo por esperantaj
verkistoj kaj tradukistoj.

La libro estas bele presita kun ko-
lora kovrilo.

Leif Nordenstorm